

# Etnismo

ISSN 0939-87248724

N-RO 74


INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

31.12.2003

## En tiu ĉi numero :

- P. 2-3 **Koncize el...**  
*Oldenburg, Gasteiz, Temuco, Frenezaj insuloj, Blufa kunveno...*
- P. 4-6 **Novajoj el Francprovencio :**  
*Intervjuo de la prezidantino de piemontaj francprovencanoj....*
- P. 7-8 **Prelego en Gotenburgo,**  
fare de Alain Favre ☐  
*Ĉu nuna eŭropa politiko favoras etnajn minoritatojn?!*
- P. 9 **El Bretonio:**  
*Kolokvo en St Nazaire pri ŝipkonstruejo, Emile Masson, homaĝo al iu profesoro pri libereco...*
- P. 10 **Leteroj de legantoj:**  
*Dankaj leteroj al Uwe Moritz, «for la Beneŝ-dekretajn!»...*
- P. 11 **Enketilo por la membroj de IKEL**
- P. 12 **IKEL-informilo...**

Dankon Uwe ☐!




Kiel vi povis vidi en la TTT-ejo de la manifestacio, IKEL fariĝis partnera asocio de la manifestacio por Eŭropa Bunto. Ĝi kongruas kun niaj celoj. Se vi intencas veni, anonciĝu al nia retadreso, ni povus formi IKEL-grupon, alportante IKEL-kontribuon.

## Programo ☐

- 09:00 Rendevuo ĉe *Place de l'Université* de Strasburgo.  
11.00 Bonvenigaj vortoj de la organizantoj kaj de la delegacioj.  
11.30 Manĝo kaj pikniko.  
12.30 Koncerto de JoMo - Jean-Marc Leclerc, de Tolosa, kiu kantas en pluraj lingvoj (laŭ Guinness Records).  
14.00 Ekstarto de la manifestacio.  
14.00 Ne rapida iro tra *allée de la Robertsau* kaj *avenue de l'Europe*, parado, sloganoj, banderoloj, flagoj, kantoj, dancoj.  
15.30 Alveno je *Orangerie* (apud Eŭropaj Parlemejoj kaj Konsilio).  
16.00 Fina parolado de grava eŭropa respondeculo.  
17.00 Gazetara konferenco.  
17.00 Disiĝo de la manifestacio... ☐ kaj eble ĝis venonta fojo (?)

# Koncize el ...



**OLDENBURGO** - La 24-an de oktobro 2003 emeritiĝis, en tiu ĉi nordokcidentgermania urbo, interesega homo: D-ro Marron C. Fort (ĉi-supra foto). Li estas de usona origino, soldatservis en Germanio kaj estris ekde 1983 la studejon pri la platdiĉa kaj la saterfrisa lingvoj en la universitato de Oldenburgo. Fort perfekte regas tiujn du lingvojn kaj verkis plurajn librojn kaj multajn artikolojn pri ili. Li estas titolata kelkfoje "savanto de la saterfrisa", tiu aparta frisa lingvoformo parolata aktuale de maksimume 1.000 homoj en la municipo Saterlando, 35 km okcidente de Oldenburgo. Nuntempe Fort estas laboranta pri manlibro pri la platdiĉaj dialektoj de Orientfrislando. (Atentu: En tiu regiono, apud la limo kun Nederlando, oni jam dum jarcentoj - malgraŭ la nomo - tute ne plu parolas la frisan lingvon, sed la platdiĉan.) **NWZ/ujm**

**GASTEIZ** - En frua aŭtuno 2003 estis publikigitaj la rezultoj de la 3-a Socilingvika Enketo realigita en Eŭskio dum 2001. Kiel la pasintajn du fojojn, la enketo kovris la tri politikajn unuojn, en kiuj estas uzata la eŭska lingvo: la Eŭskan Autonoman Komunumon (EAK), Navaron kaj Nordan Eŭskion, t. e. la franca parton.

En la EAK la plejmulto de la loĝantoj pledas por dulingveco (kastilia/eŭska), kaj esence stabiligis la transdonado de la eŭska interne de la familioj, en kiuj ne ambaŭ gepatroj aŭ eĉ nek la patro nek la patrino posedas la eŭskan. Ankaŭ inter la gejunuloj plialtiĝadas la procentaĵo de la uzantoj de tiu lingvo.

La situacio de la eŭska en la same hispania Navaro estas esence malpli bona: El la relative malmultaj personoj scipovantaj la lingvon, minoritato praktike utiligas ĝin ĉiutage.

En la franca Eŭskio, tiu lingvo havas nenian oficialecon kaj estas pli kaj pli limigata al la tradiciaj kampoj: familio, geamikoj kaj plej proksima cirkaŭo. La lingvoperdado estas evidenta, sed ŝajnas ke ĝi iomete malplirapidiĝas.

**Berripaperajjokin**

**TEMUCO** - Kion nek inkaoj, nek hispanaj koloniistoj, nek la diktaturo de Augusto Pinochet sukcesis fari, tion eventuale ja atingos la nuna "demokratio": definitive detruu la mapuĉojn. Kiel kompreneblas ke inter 1992 kaj 2002 malaperis 324.000 el la 928.000 antaŭe registritaj anoj de tiu etno? Laŭtiĝas la suspekto ke la registaro falsas la nombrojn por malserioziĝi la postulojn de la praloĝantoj de Ĉilio. Tiuj ĉi volas rehavi siajn terenojn, kiujn okupadas la blankaj farmistoj. En pasintaj jarcentoj la mapuĉoj posedis 300.000 km<sup>2</sup>, kaj nun restas al ilili 2.500 km<sup>2</sup>. La socialista prezidento Salvador Allende (1970 - 1973) estis redoninta al la mapuĉaj komunumoj 7.000 km<sup>2</sup>, el kiuj la Pinochiet-reĝimo denove enmanigis 80 % al la grandbienuloj. La sociaj strukturoj estis preskaŭ komplete neniigitaj per la privatigo de 90% el la komuna proprieto de la mapuĉa etno. Grandaj firmaoj ekspluatadas la arbarojn por eksporti lignon al Usono, Japanio, Ĉinio kaj Suda Koreio rabante tiel spacon al plantoj, bestoj kaj... homoj. Petrol-tubaro distranĉos tri

mapuĉajn komunumojn; celuloza fabriko ege malpurigos la ekologian sistemon, precipe la maron, kaj tiel nuligos la kapteblecojn por mapuĉaj fiŝistoj. Specialistoj avertegas kontraŭ la konstruado de sep akvobaraĵoj en la Biobio-rivero.

Antaŭ kvar jaroj, la registaro arestis 43 mapuĉojn kiuj proteste manifestaciis pro tiaj krimoj kontraŭ la naturo. Ankorau en novembro 2002, la 17-jara Alex Lemun Saavedra, partoprenante pacan manifestacion, estis pafmortigita far policisto.

Cetere *mapuĉe* estas vortoj el *mapudungun*, la lingvo de la mapuĉoj, kaj signifas "homoj de la tero". La ligiteco al la tero ludas gravegan rolon inter la mapuĉoj simile kiel en aro da indiĝenaj popoloj, ekzemple, inter la praaŭstralianoj.



(La ĉi-supra teksto baziĝas sur artikolo de *Sabrina Bussani* (kun maposkizo de *Claudia Blaschke*) aperinta en la germanlingva revuo *pogrom*, n-ro 220, 4-a kajero de 2003 p. **moz**)

**FRENEZAJ INSULOJ** - Komence de julio (2003) korsikanoj kaj kvin monatojn poste martinikanoj kaj gvadelupanoj (en etaj Antiloj) voĉdonis NE en samtipa referendumo, kiu celis al administra simpligo: Anstataŭ esti kaj departemento(j) kaj regiono, ĉiu el tiuj insuloj konsistigus ununuran kolektivejon. Tiaj proponoj ŝajnis tute logikaj. Kial do tiel fiaska rezulto? Oni povas trovi plurajn klarigojn: nefido al la nuna franca registaro kaj ties lokaj subtenantoj, timo al la sendependistoj (kiuj ĉie subtenis la projekton), delonga al kutimiĝo al klientismo. Tiel oni bezonas multe da politikistoj kaj ankaŭ da nebulaj kompetentoj inter du samteritoriaj asembleoj.





La NE gajnis de malmulto en Korsikio

Triumfis do la nemortigebla jakobenismo de Francio, ties mucida "respublikanismo", kiu pretendas trakti ĉiujn je la sama nivelo, sed fakte lasas iujn teritoriojn en subevoluinta situacio kultura kaj ekonomia, favoregante asistadon.

Tamen okazis du JES en tiuj konsultoj: La insuletoj Sankta-Marteno kaj Sankta-Bartolomeo fariĝis memstaraj rilate al Gvadelupo kaj baldaŭ ricevos apartan statuson. Sed bedaŭrinde nur pro financaj kialoj: Ankaŭ Francio bezonas havi siajn proprajn fiskalajn paradizojn en tiuj belaj tropikaj maroj. Ne gravas, se la ekzisto de tiaj lokoj malekvilibras la tutmondajn financajn interŝanĝojn kaj eĉ helpas al terorismo. Iom makiavele oni povas konstati, ke fojfoja eksplodo de bombo pli utilas al naci-ŝtato kaj ties «kohero» ol adopto de inteligentaj kaj trafaj leĝoj.

A.F.

**BLUFA KUNVENO** - La 4-an de oktobro 2003 okazis unuafoje en Francio ĝenerala kunveno pri la enlandaj minoritataj lingvoj. La nuna (dekstra) registaro ja tre ŝatas kredigi, ke ĝi konsultas la koncernatojn antaŭ ol fari (ne)decidon. Tial pluraj centoj da homoj kunvenis en scienca halo de Parizo, sub la direktado de Bernard Cerquiglini, kiu estras la Ĝeneralan Delegacion pri la Franca Lingvo kaj Francaj Lingvoj (DGLFLF) ĉe ministerio pri kulturo. Ĉeestis du ministroj, ĝuste tiu pri kulturo kaj lia kolego pri «lokaj liberecoj»; jam oni povas konstati la malesto de la tre potenca ministro pri edukado, eĉ se pluraj el liaj rektaj subuloj partoprenis.

Jean-Jacques Aillagon, ministro pri kulturo, malfermis la kunvenon uzante komence la ĝermanan lotringan (leceburgan) kaj la bearnan okcitanan; li proksimume diris, ke nun la regionaj lingvoj ne plu minacas la respublikon, ke la komuna malamiko estas la angla, ke estus stulte havi enlande politikon kontraŭan al la minoritataj lingvoj kaj eksterlande propagandi lingvan diversecon. Jen belaj paroloj, sed ni ne forgesu, ke la nuna dekstra plimulto en Francio ne volas ratifi la Eŭropan Ĉarton pri Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj (vidu artikolon en la sama numero) kaj interalie provas malaperigi la Diwan-lernejojn de Bretonio.

Iom ĥaose iris la debatoj; esprimiĝis interalie surduloj – kun ja tre interesaj lingvoj sed iom ekster la etno-historia temaro – kaj aŭverniano, provençano... kiuj diris ke ili uzas respektive la aŭvernjan, provençan... sed tute ne la okcitanan!

Ĉu okazis konkretaj decidoj? Kompreneble ne. Fine de tiu granda meso Bernard Cerquiglini konkludis, ke la sorto de tiuj lingvoj ĉefe dependas de la lokaj povoj... kiuj fakte havas tre malmultajn kompetentojn, kaj ekzemple tute ne povas kunoficialigi iun ajn lingvon apud la franca.

Plejmulte la delegitoj foriris kun amara gusto pri tiu perdita tago. Tamen ne ĉiuj: La savojano Marc Bron estis sufiĉe kontenta: Li sukcesis paroli antaŭ granda publiko pri la preskaŭna ne-agnosko de la francprovenca fare de la ministerio pri edukado; tagmeze li hazarde povis manĝi kun gravuloj de tiu ministerio, kaj iu – eble iom ebria – diris al li,

ke tia agnosko tro kostus. Ja Francio finance terure deficitas, sed oni tamen sciu, ke la impostoj de iuj lingvanoj iras nur al la subteno de alies lingvoj. Jen bone ilustritaj la principoj de egaleco kaj frateco proklamitaj de la ŝajne neplibonigebla kvina franca respubliko!

A.F.

Karaj Legantoj,

Jen la numero 74 de **Etnismo**. Certe vi jam ne plu ĝin esperis! Ĝi naskiĝis en la ŝvitaj de la redaktoro, kiu devis lerni novan «metion» en malmulte da tempo, kaj petas vian komprenemon. Tial vi vidas, ke tiu numero ne tiom dikas, ne perfektas, sed ne timu, la kvaliton de **Etnismo** ne malaltiĝis, kaj pro tio ni devas danki la diversajn kontribuantojn. Vi eble opinios, ke la artikoloj tro koncernas Eŭropon. Veras, ke mi estis tro okupita pri enpaŝiga lernado por povi alvoki al artikoloj, aŭ mem-verki. Sed ni povas anonci al vi, ke la venontaj numeroj pli spegulos la tutmondan realon kaj normale ampleksos. Tamen, tiucele, por ke nia revuo restu altkvalita kaj diverseca, mi reprenas la saman alvokon, kiel la antaŭa redaktoro: **Etnismo** bezonas la engaĝon de ĉiu el vi por sendi artikolojn aŭ gazeteltondaĵojn. Se vi kutimas verki, vi despli bonvenas, se vi ne kutimas verki mi povas kuraĝigi vin, dirante, ke oni pli lernas verkante ol legante. Jes, engaĝiĝi por iu kaŭzo ne nur estas peniga kaj raboplena sed ege riĉiga. Kaj la kaŭzo de **Etnismo** estas aparte defendinda. Kiel vi scias ĝi estas la sola internacia kaj etnista gazeto, kiu povas respekti veran lingvan demokration, kaj tiel ĝi donas plenan rolon al nia lingvo. Tamen pro konkretaj limoj ni ne povas promesi pri tuja apero de via sendota artikolo (vidu lastan paragrafon de **IKEL**-informilo). Pri la vivo de **Etnismo** kaj de **IKEL**, kies esprimilo ĝi estas, vi trovos je la lastaj paĝoj enketilon pretigitan de la estraro. Tiu enketilo celas vigligi la rilatojn inter la estraro kaj la membroj de la asocio, gravegas por **IKEL**, ke vi prenu kelkajn minutojn por ĝin respondi kaj aliajn por ĝin resendi al la prezidanto. De viaj respondoj dependos iu revuo kaj iu asocio daŭre proksima al viaj atendoj. Viaj leteroj restas ankaŭ bonvenaj por esprimi vian opinion, por korekti informojn, eble ne taŭgajn, aŭ por ilin kompletigi.

Vi povos konstati, ke la revuo daŭras en la sama spirito kiel antaŭe, eĉ se kelkaj detaloj respegulas personecajn sentemojn, komputil- kaj presej-ŝanĝojn. Kaj ĉi-tie ni volas danki niajn katalunajn amikojn, kiuj proponis bonan presejon je malalta prezo, kaj kiuj afable sendas la ĵus presitan numeron same kiel la sekvajn.

Se vi volas konigi vian revuon, vendante aŭ donacante numerojn de **Etnismo** ĉirkaŭ vi, numeroj estas disponeblaj je la sendoservo (adreso lastpaĝe) por la prezo de po € 5.00 (inkluzive sendokostojn), pagendaj al la kasistino. Do, karaj Legantoj, mi deziras al vi ĝuigan legadon kaj esperas, ke vi plu estos fieraj pri via gazeto.

La nova redaktorino  
Nicole Margot

**Etnistaj temoj en alia revuo**: Interesa artikolo pri Makedonio aperis en la n-o 12 / 2003, decembro, de **Monato**: **Neniu paco sen interkonsento**, de Bardhyl Selimi.

En **CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la lingvo Internacia)**, urba biblioteko, Progres 33 CH-2305 LA CHAUX-DE-FONDS, tel xx-32 967 68 55, fakso xx-32 967 68 29, retadreso: [CDELI.VCH@ne.ch](mailto:CDELI.VCH@ne.ch)

La tuta kolekto de **Etnismo** estas konsultebla, (baldaŭ perrete), pluraj duoblaj numeroj estas vendeblaj: 13,14,15,16,17,18,19,20,21,24,28,32,35,36,37,38,43,.45. 47,48, 65,66.

## INTERVJUO KUN ORNELLA DE PAOLI

Aŭgusto 2002  
Nicole Margot kaj Alain Favre

ORNELLA DE PAOLI prezidas la asocion EFFEPI (el la itala prononco de la du literoj FP, por Francoprovenzale). La francprovenca ja estas uzata en alpa parto de Piemonto, proksimume inter Gran Paradiso (sude de Aostvalo), Moncenisio (altpasejo kiu rilatigas la valon de Susa al Savojo) kaj Torino. Pli sude oni uzas tre parencan lingvon, la okcitanan, dum sur la ebenaĵo oni ĉefe parolas piemonte.

La francprovencaj valoj de Piemonto estas aparte belaj, sed vizitanto ŝokiĝas pro impreso de forlaso, de ekonomia postrestinteco. Ja multaj loĝantoj foriris por translokiĝi al la ebenaĵo, sed ankaŭ sufiĉe ofte al Parizo, Savojo kaj Romandio. Tamen somere ili revenas kaj revivigas siajn montarajn vilaĝojn.

Guste en tiu belega vilaĝeto de Val Soana, Molino, kiu dependas de la municipo Ronco Canavese, ni renkontis Ornella, kiu profesie laboras por piemonta gazeto sed dediĉas jam de dudeko da jaroj grandan tempon al lingva kaj kultura agado.



Molino



O: Ornella de Paoli; N: Nicole Margot; foje intervenas: A: Alain Favre

N. – Ornella, kiel do vi interesiĝis pri la francprovenca?

O. – Ĉar mi ŝatas ĝin...

N. – Vi venis en tiun ĉi vilaĝon, al Molino, ĉe via avino kiu parolis la lokan dialekton...

O. – Ni diris «Ĵo parlâ de no z'audi» (la lingvo de ni aliaj).

N. – Ĉu vi havas bonajn memoraĵojn pri tiu periodo? Ĉu via avino diris al vi rakontojn en «Ĵo parlâ de no z'audi»?

O. – Ne nur mia avino. La tuta vilaĝanaro.

N. – Ĉiuj... ĉu eĉ la infanoj? Kiam vi ludis kune, ĉu vi uzis la francprovencan?

O. – Jes.

N. – Do la francprovenca bone enradikiĝis en via vivo...

O. – De ĉiam mi interesiĝas pri la malmulte disvastigitaj lingvoj...

N. – Ĉu la fakto ke vi fariĝis ĵurnalistino iel rilatas al la francprovenca?

O. – Mi opinias ke ne.

N. – Ĉu vi devis studi la francprovencan? Aŭ ĉu la praktiko de tiu lingvo en la vilaĝo de via avino sufiĉis por via nuna uzo?

O. – Mi devis studi por fajnigi mian lingvouzon.

N. – Poste vi fariĝis prezidantino de EFFEPI. Diru al ni kiel tio okazis. Kiam tiu asocio kreiĝis?

O. – En 1980 ni organizis la feston de la (francprovencaj) dialektoj tie ĉi.

N. – Ĉu en Ronco?

O. – Okazis tiel. Mi jam konis okcitanojn de *Movimento Autonomista Occitano* (Aŭtonomisma Okcitana Movado, tre maldekstra politika movado, kiu aktivis en la okcitana parto de Piemonto dum la sepdekaj kaj okdekaj jaroj – ndr). Danke al ili mi renkontis Henri Armand de Centre d'Etudes Francoprovençales (centro por francprovencaj studoj, aostvala instituto), kiu konigis al mi multajn aostvalanojn. Ĵun tagon Henri Armand diris al mi: «Ĉi-jare ni devas organizi la feston de la dialektoj\* en Aostvalo kaj neniu el ni emas al tiu laboro. Ĉu vi mem ne emus ĝin organizi en Val Soana?» Tion ni faris. Sed la festo daŭris nur unu tagon ĉar ne estis sufiĉe da loko por gastigi ĉiujn partoprenantojn. Tamen estis bona okazo por renkonti francprovencajn el la aliaj (piemontaj) valoj. Kaj tiel ni fondis asocion.

N. – Do tiu festo donis al vi la impulson krei vian propran asocion...

O. – Jes, ni renkontis homojn, ni ankaŭ devis trovi adresojn de universitatanoj, kiuj interesiĝas pri la francprovenca, kaj unu monaton post la festo ni kunvenis en Ponte Canavese. Tiam ni decidis fondi asocion. Unue ni volis krei movadon, sed multaj ne samopiniis, tial ni pensis pri kultura asocio. Kaj ek!


N. – Ĉu antaŭ tio ne estis grupoj de dialekt-parolantoj en via regiono?

O. – Ne, estis la unua.

N. – Via asocio kunigas parolantojn en ĉiuj francprovencaj valoj de Piemonto. Ornella, ĉu vi prezidas tiun asocion ekde la komenco?

O. – Ne, sed mi enkalkuliĝas inter la fondintaj membroj. La unua prezidanto estis Prof. Tullio

Standardo de EFFEPI



Telmon (piemonta lingvisto, kiu ĉefe fakas pri la francprovenca kaj okcitana, ndr), sed li demisiis sufiĉe rapide kaj tiam ni elektis la plej maljunan el ni, Ennio Varonetto, el Selvaggio di Giaveno, kiu naskiĝis en 1943. En nia komenca periodo ne estis maljunuloj. Nun la anoj pli aĝas.

A. – Kiom da membroj havas via asocio?

O. – Ĉirkaŭ cent en ĉiuj valoj.

N. – Ĉu vi bone interkompreniĝas de iu valo al la alia?

O. – Jes, ni provas. Mi

komprendeas la aliajn sed iuj penas min kompreni. Ni ankaŭ interkompreniĝas kun la francprovencaj de Aostvalo. Kun ili

ni organizas konkurson jam de dudeko da jaroj. Ĉiujare ĉiuj lernejoj povas partopreni. Ni povas kalkuli je ĉirkaŭ 400 partoprenantoj. Tia nombro povas esti konsiderata kiel granda, rilate al la malmultaj lernantoj, kiuj troviĝas en la vilaĝaj lernejoj. Ekzemple en Ceresole estis nur tri lernantoj dum la lasta jaro. Feliĉe ekzistas pli grandaj lernejoj, kiel en Ponte Canavese aŭ Gavieno.

N. – Ĉu ĉiuj infanoj parolas la francprovencan?

O. – Jes, kaj ili devas skribi en sia dialekto.

N. – Vi diris ke vi iras de klaso al klaso por instrui la dialekton...

O. – Jes, kaj nun estas nova leĝo, kiu antaŭvidas la instruadon de la francprovenca ekde la antaŭ-elementa lernejo ĝis la universitato.

N. – Kaj ĉu tio vere efektiviĝas?

O. – Ankorau ne.

N. – Ĉu estas municipoj, kie oni instruas la francprovencan?

O. – En Giaglione, okazas kursoj, sed ĝis nun tio dependis ĉefe de ĉies bona volo. Ekde du jaroj oni povas organizi oficialajn kursojn.

N. – Kaj kio pri la instruistoj? Ĉu estas sufiĉe da? Ĉu ili estas trejnataj?

O. – Jen la problemoj, trejni la instruistojn...

N. – Kiel en Savojo...

O. – Nia problemoj estas la manko de komuna skribmaniero.

N. – Vi parolis pri Giaglione. Mi aŭdis, ke tie oni kreas centron pri minoritataj lingvoj de Piemonto. Ĉu vi opinias ke tiu centro povus okupiĝi pri la trejnado de instruistoj?

O. – Mi ankoraŭ ne bone komprenis, kio okazas en tiu centro. Mi opinias, ke estus interese por ni francprovencanoj se la esplorado pri la lingvo okazus en Aostvalo. En Aosto estas universitato (tamen tute embria, ndr). Aŭ tio povus okazi en Torino.

N. – La savojanoj provas krei centron. Ĉu vi planas kunlabori ankaŭ kun ili?

O. – Kompreneble. Oni ĉiam devas kunordigi la strebojn...

N. – Tia kunordigado jam iom ekzistas kadre de la Romanda kaj Interregiona Federacio de la (francprovencaj) dialektparolantoj. Kion vi opinias pri tio?

O. – Tiun federacion mi ne bone konas... Jam estas kontakto, ekzistanta strukturo, oni devas ĝin plivastigi.

N. – Rilate la skribmanieron vi havas apartajn problemojn en Piemonto, sed kion vi opinias pri la propono de D. Stich por komuna grafio?

O. – Ni ja bezonas komunan skribmanieron, sed tiun de D. Stich mi ne konas. Mi ne scias, ĉu ĝi povos esti akceptita de ĉiuj.

N. – Kaj ĉu en Piemonto vi prilaboras grafion?

O. – Ĝis la jaro 2000 ni eĉ ne provis elekti skribmanieron. Iuj uzas grafion proksiman al tiu de la itala. Ni ĉion akceptis ĝis nun. Sed ekde la enkonduko de tiu nova leĝo (kiu agnoskas interalie la francprovencan, ndr), se ni volas kapti tiun okazon, ni devas elekti. Ni provis kunlabori kun la aostvalanoj, sed mi opinias ke ni devas kunlabori kun homoj de la tuta francprovenca areo, alikaze ni perdas nian tempon.

N. – Ĉu vi ne opinias utile labori unue en Piemonto kaj poste adopti komunan skribmanieron?

O. – Ne, pro tiu nova itala leĝo, la skribmaniero de ni proponita iĝos oficiala kaj ne plu eblos proponi alian. La elektita grafio estos uzata en la lernejoj, poste en la municipoj kiel administra lingvo, kaj en la gazetoj. Oni antaŭvidas apartajn paĝojn en la taggazetoj por la minoritatoj.

N. – Ĉu ekzistas francprovencan literaturon en Piemonto?

O. – Jes, estas kelkaj skribaĵoj. G. Tuillon (fama savoja fakulo pri la francprovenca, ndr) trovis malnovan tekston de la Susa Valo, li nun studas ĝin. Sajnas esti la plej antikva.

N. – Kaj kio pri la kanzonoj?

O. – Ni kreas kanzonfestivalon, kiu nun estas en sia kvara jaro. La lastjara temo estis la vintro. Fakte ankaŭ estis la temo de la lerneja konkurso, do la festivalo sekvis. Ĉiujare kadre de tiu festivalo kreiĝas almenaŭ unu nova kanzono. Ni ankaŭ organizas poezian festivalon kun la okcitanaj kaj parolantoj de ĉiuj lingvoj kaj dialektoj de Italio.

N. – Entute la aliaj lino-minoritatoj, interalie la okcitanaj, ege stimulas vin.

O. – Jes, la okcitanaj ege vigligas nian agadon.

N. – Kaj kiel vi taksas la influon de la piemontaj?

O. – Dum multaj jaroj la piemontanoj (tiu de la ebenaĵo, kiuj uzas la piemontan, ndr) tute neis la ekziston de la aliaj lingvoj. Tiujn ili konsideris misparolata piemonta.

N. – Pro tio oni povas diri, ke la piemonta ne estas minoritata lingvo...

O. – Estas kolonia lingvo... ĝis Aostvalo. La piemontistoj ĝis antaŭ dekvino da jaroj ne bone komprenis, kion ni faras ĉi tie... Ili kreas piemontistajn asociojn ĝis en niaj valoj.

Folkloro grupo en Viù verkis interesajn librojn, sed multaj longe kredis, ke temas pri la piemonta.

N. – Kaj nun ĉu vi plu konsideras la piemontan kiel danĝeran?

O. – Jes, la piemonta daŭre progresas en la valoj, sed ankaŭ la itala pere de la televido. Oni absolute devas krei programojn en la francprovenca, kiel antaŭvidas la leĝo. La privataj televidoj estas uzataj de la piemontanoj.

N. – Kaj ĉu tiu nova leĝo longe aplikiĝos?

N. – Ĝi ĵus estis aprobata.

A. Ĝi estis aprobata danke al la Eŭropa Ĉarto pri Minoritataj Lingvoj... Estus malfacile reiri malantaŭen. En Francio nun ĉio estas blokita sed iam ankaŭ ni rajtos havi radio- kaj televidprogramojn. Tiam ni devos kunlabori, almenaŭ por limigi la elspezojn. Tiu leĝo jam devintus ekzisti antaŭ kvindek jaroj, kiam kreiĝis la itala respubliko. La konstitucio tion antaŭvidis je la iniciato de la Ĉarto de Chivasso, ellaborita de la aostvalanoj kaj de la valdanoj\*\*, la etaj popoloj de la alpoj. H. Coisson, subskribinto por la valdanoj, iris en 1993 al Aostvalo por memorfesti la kvindek jarojn de tiu dokumento. Li diris en perfekta franca, ke tiu ĉarto estis inspirita de la svisa federismo. Do la sesa artikolo de la itala konstitucio de 1948 tekstas: «La respubliko protektas la lingvajn minoritatojn per celtrafaj normoj».

#### Mapo el la francprovenca vortaro

La sago montras Pont, Ponte Canavese en la itala. Ronco Canavese situas pli norde. Lans: Lanzo en la itala, Susa: Susa.





O.- Necesis pli ol kvindek jaroj por konkretigi tiun artikolon. La parlamento ne sukcesis aprobi leĝon, kiu estis resendita de unu ĉambro al la alia. La dekstrularo ĝin kontraŭstaris, kaj ankaŭ la maldekstraj intelektuloj. Finfine en 1999 la leĝo estis aprobita\*\*\* danke al favoraj cirkonstancoj, tiom pli ke la aostvalaj kaj sudtirolaj parlamentanoj formis apartan parlamentan grupon.

N. – Ĉu vi havas rilatojn kun eŭropaj instancoj, ekzemple kun la Eŭropa Buroo por la Malpli Disvastigitaj Lingvoj?

A. - En la retejo de la Eŭropa komisiono, sur la paĝo pri minoritataj lingvoj, mi vidis, ke la francprovenca aperis kiel la unua inter la lingvoj, kiujn oni helpis per subvencioj, sed en tiu kazo nur en Italio.

O. – Ni prezentis du projektojn kaj ja ricevis helpon. Ankaŭ la aostvalanoj ricevis subvenciojn por siaj popolaj vesperaj kursoj de la francprovenca.



Ekzilitoj revenas ferii en Ronco kaj studas la francprovencan lingvon

politikistoj ekkomprenas la gravecon de la identeco. Esti francprovenca preskaŭ fariĝas marko. Tio povas allogi homojn, vizitantojn, turistojn. Estas pluso por ĉiuj niaj regionoj, kaj mi sufiĉe optimistas rilate al estontaj kunlaboroj ene de la francprovenca areo.

N. – Jen lasta demando temas pri la ligo inter identeco kaj ekonomio.

O. – Se la kono de minoritata lingvo alportas laborpostenojn, kompreneble la identeco plifortiĝas. Tion mi vidis en Katalunio, eĉ en la norda (francia) parto. Homoj, kiuj scipovas la katalunan pli facile povas komerci, interalie kun Barcelono.

A. - Pro tio oni devus krei iun «Francprovencon». Ĝis nun neniam estis francprovenca popolo, estas nur savoĵanoj, piemontanoj, vaŭdanoj...

O. - Jes, ni devus agnoskigi francprovencan eŭroregionon. Tamen ĉe ni la lokaj

Notoj

\*La «*festo de la dialektoj*», fakte *festo de la francprovenca lingvo*, okazas nun ĉiujare dum semajnfino en aŭgusto aŭ septembro, laŭvice en Savojo, Piemonto, Romandio kaj Aostvalo. En 2004 ĝi okazos en piemonta municipo.

\*\* Pri la valdanoj, vidu la artikolon de Nicole Margot kaj Alain Favre en la lasta numero de *Etnismo* (n-ro 73).

\*\*\* Oni tamen devas rimarki, ke ne ĉiuj italaj lingvoj estas protektataj de tiu leĝo. Ekzemple la padana, kiu inkluzivas interalie la piemontan, ne estas agnostika kiel lingvo, sed nur kiel dialekto de la itala, ĉefe pro politikaj kialoj.

## VORTARO FRANCPROVENCA-FRANCA, FRANCA-FRANCPROVENCA

Far Dominique Stich\*

Unuafoje vortaro traktas la francprovencan lingvon en ĝia tuto, dum ĝis nun oni konsideris nur la savoĵan, aostvalan, vaŭdan, valezan, lionan... ne parolante pri lokaj dialektoj – kies envortarigo tre utilas, sed ne povas doni ĝeneralan bildon de tiu ankoraŭ ne sufiĉe diskonigita latinida lingvo. Ĝuste la uzo de la grafio ORB – sufiĉe proksima al tiuj de la franca, okcitana kaj kataluna – ebligas montri la komunaĵojn inter la malsamaj variantoj kaj ankaŭ kun la plej parencaj lingvoj.



Tiu tre bele prezentita kaj bindita 600-paĝa libro estas pli ol nura vortaro. En ĝi troviĝas ankaŭ gramatiko, toponimoj, neologismoj kaj eĉ antologio kun tekstoj el ĉiuj regionoj de la francprovenca areo.

La prezo estas 48 eŭroj, inkluzive de la sendokostoj por la legantoj de *Etnismo*. Kontakti Alain FAVRE, Allée du Quart d'Amo 171, F-74140 CHENS-SUR-LEMAN, SAVOJO, Tel. +33 (0)450 94 02 08 afavre1@hotmail.com

\*Doktoro pri lingvistiko (Paris V - la Sorbonne), svis-aleman-devena, de longe interesiĝas pri minoritataj lingvoj kaj multon scias pri esperanto, interalie pro admiro al Zamenhof. Aŭtoras librojn pri la francprovenca, la alemana kaj nuntempe prilaboras lernolibron de la romanĉa por franclingvanoj.

**Savojo kaj Nico.** Fine de oktobro 2003, dum la oka kongreso de la Savoĵa Ligo, ties ĝenerala sekretario (kaj regiona konsilanto) Patrice Abeille subskribis interhelpan kontrakton kun Alain Rouillé, prezidanto de la antaŭnelonge kreita Ligo por la Restaŭro de la Nicaj Liberecoj. Ambaŭ movadoj ĉelas la sendependecon de sia teritorio kadre de Eŭropa Unio. Dum jarcentoj Savojo kaj Nico estis kune en la sama ŝtato, kune ili estis aneksitaj de Francio en 1860, kadre de manovroj ĉirkaŭ la kreado de la itala regno sub savoĵa dinastio. Ne nur francaj aŭtoritatoj ne tre kontentis pri tiu kontrakto, sed ankaŭ iuj okcitanaj, kiuj akuzis la Savoĵan Ligon ke ĝi volas apartigi la nicanojn de la aliaj okcitanaj.

Ni memorigas al vi la neceson de via partopreno al nia revuo. Ne forgesu sendi viajn kontribuojn. La limdaton por la venonta numero ni fiksas je la **30an de aprilo 2004**.

Ne forgesu ankaŭ nian enketilon je la paĝo 11a. Ĝin plenumu kaj resendu al Daniele Vitali, 6 rue du Fort Wallis L-2714 Luxembourg.

# ĈU LA NUNA EŬROPA POLITIKO FAVORAS ETNAJN MINORITATOJN?

**Prelego farita de Alain FAVRE kadre de la universala kongreso de Gotenburgo aŭgusto 2003**

*Tiu prelego perfekte integriĝis en la kongresa temo "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj". La 80-persona salono estis tuteplena kaj restis plena ĝis la fino de la prelego, kiu estis sekvata de IKEL-stando en la akceptejo (vidu IKEL-informas lastpaĝe).*



## 1/ Enkonduko

Ne ĉie etnoj estas minacataj, tamen eĉ en Eŭropo multaj estas, kaj konsciaj etnanaĵoj ŝatus trovis solvon por povi konservi sian identecon.

Tie ĉi en Svedio oni troviĝas kaj en Eŭropo kaj en la Eŭropa Unio. Por multaj homoj ambaŭ teritorioj estas samaj, tiom pli ke venontjare EU fariĝos 25-ŝtata, entutigante la plimulton de la landoj kaj ankaŭ de la loĝantoj de la kontinento. Sed jam de longe ankaŭ ne EU-landoj estas koncernataj de la eŭropa politiko.

Ĉi-matene mi parolos nur pri formala politiko de Eŭropo, ne pri ĝenerala politika orientiĝo. Ekzemple mi ne traktos la temon de la nun tre moda emo al (ekonomia) liberalismo, kiu certe influas la vivon de minoritatoj. Oni povus ankaŭ sin demandi, ĉu la mala tendenco – nome tiu de la alimondanismo – havas pozitivan alrigardon al etno-minoritataj problemoj. Sed eble pri tio pli malfrue, dum la debato.

## 2/ La Konsilio de Eŭropo

Oni ne ofte parolas pri tiu organizo, fondita en 1949 kun la ĉefaj celoj protekti la homajn rajtojn kaj la fundamentajn liberecojn en Eŭropo, kaj kompreneble akceli la kunlaboradon inter la diversaj ŝtato-membroj. Fakte tiu organizo okupiĝas pri multaj aferoj – interalie edukado, sano, konsumado – kaj kvankam ne same "suverena" kiel EU, ĝi tamen vere glatiĝas la vojon por eŭropa integriĝo.

Ĉar la ĝenerala publiko vere malmulton scias pri la Konsilio de Eŭropo, mi rapide klarigas, kiel ĝi funkcias. Ĝi do konsistas el du niveloj: Unue la parlamento; temas pri ŝtataj parlamentanoj, kies nombro proporcias al tiu de la loĝantaro (ekzemple Germanio havas multe pli da, ol Slovenio). Due la komitato, kiu konsistas precipe el la ministroj pri eksterlandaj aferoj de la ŝtato-membroj. Nur tiu lasta instanco estas decidpova. Laŭvice ĉiu ŝtato prezidas la Konsilion de Eŭropo dum ses monatoj.

Preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo (inkluzive de Ruslando kaj Turkio) estas membroj de tiu organizo. Vatikano estas observanto kaj Belorusio ne sufiĉe demokratas por membri. Ankaŭ Japanio, Kanado kaj Usono estas

observantoj kaj eĉ povas subskribi tekstojn de la Konsilio de Eŭropo.

Lasta sed grava rimarko en tiu prezento: La tekstoj (traktatoj) estas adoptitaj laŭ la regulo de plimulto, ne de unuanimeco kiel en la nuna EU. Tamen oni kompreneble diplomate agas, por ke en iuj delikataj situacioj neniu ŝtato "perdu la vizaĝon". Kaj la traktatoj ne estas aparte devigigaj, eĉ se ŝtato, kiu daŭre rifuzus ilin subskribi ne aspektus tre demokratiema nek kunlaborema.

## 3/ Kadra konvencio pri la protekto de naciaj minoritatoj

Oni povas diri, ke tiu teksto, adoptita de la komitato de ministroj de la Konsilio de Eŭropo la 10-an de novembro 1993 kaj disponebla por subskribo la 1-an de februaro 1994, aperis post kvardekjara pretigo. Ja la temo estas tikla, sed ĉiu homo rajtas je nacieco, eĉ se ĝi estas minoritata, do malsama al tiu de la plimulto de la samŝtata loĝantaro. Ankaŭ malrespekto al la minoritatoj, aŭ ties "pretendemo", povas kaŭzi konfliktojn, ĉu ene de ŝtatoj, ĉu inter ili. Pro tiuj du ĉefaj kialoj – unue homaj rajtoj, due problemoj de stabileco kaj sekureco en Eŭropo – oni alvenis al tiu konvencio, kies efektiviĝo ŝajnis ebla en la Eŭropo de la naŭdekaj jaroj, ĵus senigita de la fera kurteno kaj ties politikaj sekvoj.

Tiu teksto konsistas el 32 artikoloj arigitaj sub 5 sennomaj titoloj, post ne tre longa enkonduko. En tiu ĉi lasta oni povas legi: "Socio demokrata devas ne nur respekti la etnan, kulturan, lingvan kaj religian identecon de ĉiu nacia minoritato, sed ankaŭ krei apartajn kondiĉojn por esprimi, konservi kaj disvolvi tiun identecon." La diversaj artikoloj temas ĝuste pri tiuj kondiĉoj, kiujn la ŝtatoj devas favori, specife la egaleco kun la aliaj civitanoj, ne-diskriminacio, praktikado de lingvo kaj religio, rajto je nomo en minoritata lingvo, rajto je kreo de asocio, edukado k.t.p.. Tiu traktato ankaŭ favoras internaciajn (interŝtatajn) kontaktojn inter la minoritatoj, aŭ inter ili kaj alia lando, kie la sama nacieco ekzistas. Kompreneble la minoritatoj devas respekti la ĝeneralajn leĝojn de sia ŝtato – krom se tiuj diskriminacias ilin. La ŝtatoj, kiuj subskribis (unua etapo) kaj ratifis (dua etapo) tiun konvencion devas, ĉiun kvinan jaron (aŭ pli ofte laŭ peto de la komitato de ministroj) fari raporton pri sia agado sur tiu kampo kaj ricevas respondon aŭ komenton de la Konsilio de Eŭropo, post ekzameno de la raporto far spertuloj.

Ne malutilas precizigi, ke la aparteno al iu nacia minoritato estas libera elekto de unuopulo.

Sufiĉis la subskribo kaj ratifo de 12 ŝtatoj por efektiviĝi tiun konvencion. Tio rapide okazis; je la 16-a de julio 2003, kiam mi lastfoje konsultis la reton antaŭ ol forlasi mian hejmon, 42 ŝtatoj subskribintis la traktaton, 35 ratifintis ĝin kaj 31 jam sendis raporton. Ne subskribis: Andoro, Francio, Turkio. Ne ratifis: Belgio, Latvio, Luksemburgio, Nederlando, Islando. (Rimarkindas, ke Grekio ne troviĝas en la listo de rifuzantoj; sed vidu tiuj poste...).

Kvankam tiu konvencio konsistigas veran progreson, gravaj problemoj restas. Unue, kio estas "nacia minoritato"? La kadra konvencio mem ne provas difini tiun terminon. Tamen la vorto "nacio" povas esti komprenata tre diversmaniere. En Rusio nacioj estas ege multaj. En Francio kaj kelkaj aliaj landoj, kie ŝtato praktike egalas al nacio, povas esti nur unu, kaj konsekvence ties etnaj minoritatoj neniel povos esti protektataj de ne aplikebla traktato: Finfine ne gravas, almenaŭ en la nunaj kondiĉoj, ĉu tiaj ŝtatoj subskribas kaj ratifas la konvencion aŭ ne.

## 4/ Eŭropa ĉarto pri regionaj aŭ minoritataj lingvoj

Tiu teksto estis akceptita de la Konsilio de Eŭropo la 5-an de novembro 1992, tio estas antaŭ la konvencio por la protekto de la naciaj minoritatoj, pri kiu ni ĵus parolis. Tamen ĝia akcepto estis principe malpli tikla: Eĉ ŝtatoj, kiuj sin deklaras ununaciaj, iel agnoskas sian plurlingvecon. Tio ne malebligas, ke tiu dokumento vekos malfidon, eĉ timon ene de sufiĉe multaj ŝtatoj, ĉefe pro sia precizeco kaj postulemo. Ankaŭ tre facile komprenebla en sia apliko ĝi ne estas.

La iom singarda enkonduko de tiu ĉarto tute ne aludas naciajn minoritatojn: Oni ĉefe parolas pri kultura riĉeco de Eŭropo, rajto je propra lingvo, endanĝerigita situacio de multaj minoritataj lingvoj, pozitivaj ecoj de plurlingvismo. Oni ankaŭ diras, ke la protekto kaj kuragiĝo de regionaj aŭ minoritataj lingvoj ne devas okazi damaĝe al la oficialaj lingvoj.

Male al la antaŭe menciita kadra konvencio, kiu ne difinas naciajn minoritatojn, tiu ĉarto proponas en sia unua artikolo difinon de la regionaj aŭ minoritataj lingvoj: Oni precipe aludas pri tradicie parolataj lingvoj, ekskludante la "dialektojn" kaj ankaŭ la lingvojn de enmigrintoj. Kaj kompreneble pri tio oni povus longe komenti.

Kiam iu ŝtato ratifas la ĉarton, ĝi devas indiki kiujn lingvojn ĝi elektis, kaj por ĉiu lingvo sin devontigi al apliko de almenaŭ 35 el la naŭdek-kelk paragrafoj aŭ alineoj de la ĉarto, kun kelkaj kvantaj devigoj en iuj artikoloj.

Tio povas ŝajni sufiĉe komplika, kaj ja estas; ofte gravaj juristoj devis interveni por, dum iuj landaj debatoj, ĵeti iom da lumo kaj forigi falsajn interpretojn. Oni tamen povas rimarki, ke iu ŝtato rajtas elekti malsaman (eĉ nulan) protektonivelon por siaj diversaj minoritataj aŭ regionaj lingvoj. La iom pli ol naŭdek dispozicioj pri kiuj mi parolis troviĝas en la tria parto de la ĉarto, tio estas en la artikoloj 8 (instruado), 9 (justico), 10 (administracio kaj publikaj servoj), 11 (amaskomunikiloj), 12 (kultura vivo), 13 (ekonomia kaj socia vivo) kaj 14 (translimaj interŝanĝoj).

Ĉiun trian jaron, ŝtato kiu ratifis la ĉarton devas sendi raporton, kiu estas ekzamenita de spertuloj, kaj ĉiun duan jaron la ĝenerala sekretario de la Konsilio de Eŭropo faras detalan raporton antaŭ la parlamento.

Tiu ĉarto validas ekde la 1-a de marto 1998, kiam 5 ŝtatoj jam ratifis ĝin. Pri subskriboj kaj ratifoj, jen la situacio je la 16-a julio 2003

NE SUBSKRIBIS	SUBSKRIBIS SED NE RATIFIS
Albanio	Azerbajĝao
Andoro	Ceĥio
Belgio	Francio
Bosnio kaj Hercegovino	Islando
Bulgario	Luksemburgio
Estonio	Malto
Grekio	Moldavio
Irlando	Polio (sed ĵus subskribis)
Kartvelio	Rumanio
Litovio	Rusio
Portugaliao	Makedonio
San-Marino	Ukrainio
Serbio kaj Montenegro	
Turkio	

Je la sama dato subskribis kaj ratifis 17 ŝtatoj. Inter la ŝtatoj kiuj ankoraŭ ne ratifis, iuj tion baldaŭ faros, sed en aliaj, la situacio vere estas blokita, kiel en Francio, kie decido de la Konstitucia Konsilantaro malpermesis la ratifon.

En multaj ŝtatoj la apliko de tiu ĉarto jam havis pozitivan konsekvencon por minoritatoj. Ekzemple en Svislando la romanĉa fariĝis oficiala je federacia nivelo en ĝia skriba formo Rumantsch Grischun, kaj en Italio tio akcelis la akcepton de leĝo celanta la protekton de lingvaj minoritatoj, ja antaŭvidita de la konstitucio (vidu pri tio la intervjuon de Ornella de Paoli en la sama numero, ndr).

## 5/ Projekto de eŭropa ĉarto pri regiona aŭtonomio

Jen interesa teksto, ĉar multaj etnoj loĝas en aparta regiono de iu ŝtato: Povus utili, se tiaj regionoj – kaj finfine ankaŭ la aliaj – havus pli fortan aŭtonomion.

Tiu teksto baziĝas ĉefe sur la principo de "subsidiareco", laŭ kiu oni traktas ĉiun problemon je la kiel eble plej malalta kompetenta nivelo de decido, tio estas do plej proksime al la koncernataj civitanoj. Interesa punkto en tiu projekto estas la fakta kreado de translimaj regionoj. Ankaŭ troviĝas en tiu projekto pli da dispozicioj, kiel la ebleco por la ŝtatoj ne konsideri ĉiujn el siaj regionoj je la sama nivelo, kio povas konduki al tute malsama traktado de minoritatoj en la sama lando – kaj tio ja tro ofte okazas jam nun.

## 6/ Kio pri la Eŭropa Unio? Kiaj perspektivoj entute por eŭropaj etnaj minoritatoj?

Ekde sia fondiĝo sub alia nomo en 1957 EU funkcias laŭ la regulo de unanimeco. Tio kompreneble ne aparte favoras aŭdacan politikon rilate la etnajn minoritatojn. Tamen tiu regulo ne plu efektiviĝos ekde majo 2004, kiam la unio fariĝos 25-ŝtata, oni do rajtas havi esperojn. Aldone jam unu komisaro (aŭ komisionano) okupiĝas pli precize pri la minoritataj lingvoj kaj mastrumas subvenciojn, ekzemple tra la projekto Arkipelago. En la retejo de la Eŭropa Komisiono oni povas scii pli pri tio, mi eĉ sukcesis rekte korespondi kun tiu komisaro pri mia propra etna lingvo.

Ŝajnas do, ke la eŭropaj instancoj serioze traktas la problemon de la etnaj minoritatoj. Kial?

Mi jam aludis pri la homaj rajtoj (en tiu kazo rajto je propraj lingvo kaj kulturo) kaj ankaŭ pri la sekureca aspekto de tiu problemo: Eĉ en la nuna, preskaŭ paca Eŭropo, konfliktoj povas ekesti pro etnaj diverĝoj inter du aŭ pluraj ŝtatoj. Multajn ekzemplojn oni povus trovi, mi nur menciui, ke membro de la Konsilio de Eŭropo ĝis nun eĉ ne havas oficialan nomon: Ĝin oni ja nomas "Eks-jugoslava respubliko de Makedonio".

Krom tiuj du ne neglekteblaj aspektoj, ŝajnas ke oni povas trovi aliajn kialojn por klarigi tiun sufiĉe pozitivan sintenon al etnaj minoritatoj:

Etnismo de la malplimultanoj plej ofte favoras eŭropismon kaj male kontraŭas ŝtatnaciismon kaj ŝovinismon. Tre ofte etnoj ekzistas ambaŭflanke de ŝtataj limoj kaj tial ili iel cementas Eŭropon, eĉ se tro ofte oni ĵetis niajn patrojn en milito unu kontraŭ la aliaj, provante doni al ili la "landliman mensostaton" kaj hontigante ilin pro tio ke ili parolas la "lingvon de la malamiko".

Oni bone scias, ke Usono fariĝis el genta mikspoto – ne nur el "plimultanoj", sed ankaŭ el judoj, irlandanoj, eŭskoj, eĉ sklavidoj... - kaj tiu konfronto de kulturoj ege gravis por potencigi la landon. Eĉ se nun elmigrado al tiu lando ne plu tiom gravas kvante, multaj el ĝiaj nunaj sciencistoj kaj entute intelektaj elitanoj plu venas el eksterlando, eĉ el minoritatoj. Ŝajnas do, ke multaj respondeculoj de EU konscias pri tio kaj bone komprenas, ke la kultura bunteco konsistigas karburadon de progreso; pro sia deviga kaj do fakta plurkultureco, etnaj malplimultanoj troviĝas kvazaŭ pinte de tiu fenomeno.

Mi do alvenas al la fino de tiu prelego. Eble vi opinias, ke mi tro optimismas. Ke se mi vere pensas, ke la kondiĉoj fariĝas nun pli bonaj por etna agado, ni ne forgesu, ke la ĉefa punkto restas nia entreprenemo, nia "batalemo" mem. Nun pli da okazoj aperas, ni do kaptu ilin, ne timante rekte aliri eŭropajn instancojn, kaze de nekomprenebla fare de la ŝtato, de kiu ni dependas. Ankaŭ ni ne nur rajtas sed devas liberigi nin de la minuskompleksoj, kiujn oni enigis en nian kapon foje jam en la familio, pli certe dum nia studado ekde la elementa lernejo, kie ekzemple nia lingvo estis malpermesita, nia historio tabuigita. Kaj ni ne forgesu, ke pro nia agado estos pli da paco, pli da justeco kaj pli da progreso en la tuta Eŭropo.



## El Bretonio . . .

### Francilingva kolokvo en Saint-Nazaire pri Queen Mary 2.

La 29an de novembro 2003 esti organizita kolokvo, kiu traktis la historiajn ligilojn (Kelta Interligilo) inter la ŝipkonstru-arto en Clyde kaj en la Loire-estuaro, kaj pri la soci-ekonomia evoluado de la bretonaj ŝipkonstruejoj de 1860 ĝis hodiaŭ. Tiu kolokvo estis organizita de Bretona Kultura Instituto sub la patroneco de ALSTOM-Atlantique (ŝipkonstruejo de Saint-Nazaire) kaj de Cunard Line (ŝipproprietulo de Queen Mary 2) rilate kun Instituto de Ekonomiko Mara kaj etnografia muzeo de Saint-Nazaire. Tiu kunveno honore akceptis la ŝipestron Ronald Warwick, kiu prokrastis sian emeritiĝon por stiri la Queen Mary 2 dum ĝia unua vojaĝo.

La kolokvo komenciĝis per silenta minuto, kun muziko "Amazing Grace" de skota sakfluto registrita sur sonbendo por funebri la morton de 15 personoj (vizitantoj kaj laboristoj) okazinta la 15-an de novembro 2003 pro rompigo de alira ponto.



Yvonig Gicquel, prezidanto de Bretona Kultura Instituto kaj Hubert Chémereau, rezidanto de CREDIB (Centre de Recherche et Diffusion de l'Identité Bretonne) malfermis la kolokvon.

Sep intervenantoj raportis pri diversaj punktoj dum la tuta tago: ŝipkonstruado en la historio de St Nazaire, John Scott fondinto de la unua granda ŝipkonstruejo en St Nazaire, studaĵo de etnografia muzeo de St Nazaire kun projekciado, historio de Cunard-Line kaj Clyde-ŝipkonstruejo, Clyde kaj Loire estuaro du naskiĝlokoj de la ŝipoj de *Compagnie Générale Transatlantique*, historio de ŝipkonstruejo de St Mazaire, konstruado de Queen Mary 2 en St Nazaire, estonto de ŝipkonstruado en Francio kaj en Britio kaj debato pri tiu temo. Estas notinde, ke Cunard-Line, ŝipkonstruejo de St Nazaire, kiu estis pasinte tre granda estas complete senenhava hodiaŭ. Nur unu gruo estas la sola memorsigno de ĝia ega aktiveco.

Daniel Houguet

### Homaĝo al profesoro pri libereco.

Kadre de la Jaro Emile Masson, dediĉita al memorigo de la 80-jariĝo de lia morto, Internacia kolokvo okazis en Pontivy la 26an kaj 27an de septembro 2003 pri la temo «Emile Masson, Zamenhof: minoritataj lingvoj, internacia lingvo».

«Ribeliĝo estas via plej sankta devo, ribeliĝo kontraŭ ĉio, kiu vundas vian koron, vian racion, en vi-mem, kaj ĉirkaŭ vi».

Emile Masson, bretona verkisto kaj filozofo (1869-1923) estas un el tiuj neklaseblaj homoj prudente

forgesitaj de la Historio dum preskaŭ unu jarcento: revoluciulo sed kontraŭperforta, pacifisto, humanisto, feministo, ekologiisto, poeto, engaĝita en ĉiuj luktoj, sed ribela al ĉia politika enbrigado... Ne de tre longe oni remalkovris lian verkon kaj rekonstituis lian tutan vivon. Naskita en Brest, en popola kvartalo, li rapide konsciis pri la laborista mizero, la socia malegaleco kaj la hipokriteco de patriotismo.

«Patrio, - li skribis - estas nur ĉiaspeca, vasta kaj kompleksa komercejo kaj ekspluatejo por financistoj kaj por la alta burĝaro kiu dependas de ili...»

Malriĉa studento en Parizo, kaj poste en Britio, li kreas al si vastan filozofian kulturon kompletitan per la ideoj de la grandaj liberpensuloj: Elisé Reclus, Kropotkine, Jean Grave. La Dreyfus afero lin enmerĝigas en tiu stimula etoso, kie intelektuloj kaj laboristoj renkontiĝas sur la samaj benkoj de la Popolaj Universitatoj, serĉante Justecon kaj Veron. Dum sia tuta vivo li alte taksos iun «*revolucion de la konscio*», kie ĉiu devas esti ekzemplo, ne nur parole, sed per individua kaj ĉiutaga politika engaĝiĝo.

Edziĝi ta al britino tiom revoluciema kaj malkonformistema, kiom li, Emile Masson instruos la anglan lingvon en la liceo de Pontivy, kerne de Bretonio, dum la plej granda parto de sia vivo. Tie li decidis lerni la bretonan lingvon, inter alie per la revuo Brug, la sola liberpensa dulingva revuo eldonita en Bretonio por la lokaj kamparanoj.

«Mi opinias, ke lasi lingvon morti estas same krime kiel lasi homon morti».



li skribis.

Samtempe internaciista, li same defendis la uzon de nia lingvo por paco inter la homoj.

Dum la Granda Milito de 1914, Emile Masson klare sed klandestine elmontris siajn pacemajn konvinkojn. Tiu elĉerpiga kaj ne rekonata luktado meze de la ĉiutaga milita horormurdado certe kontribuis al la malplibonigo de lia psika stato. Psikiatre malsana li mortis post monatoj da hospitaligo en la kliniko Picpus en Parizo.

El la presservo de SAT-Amikaro  
Marielle Giraud

Alia manifestacio pri Emile Masson okazis la 29an de novembro 2003 en Pontivy kun pluraj prelegoj kaj ekspozicio.

## Leteroj de legantoj.

Rimarkoj pri no 73 de **Etnismo** :  
En Saint-Nazaire, la 3an de julio 2003

Estmata Samideanino,

Mi ĵus ricevis la numeron 73 de **Etnismo**.

Tiel mi legis, ke vi estas nova redaktorino de nia revuo.

En «Koncize el...» p. 2, en la paragrafo KEMPER, ĉu tiuj, kiuj ne parolas la anglan kaj la francan komprenis la vortludon: Phare Ouest / Far West?

Phare ouest: okcidenta lumturo (aŭ simbole klarigilo)  
Far west: malproksima okcidento.

En la paragrafo RAEANN, mi supozas, ke temas pri la bretona urbo RESNAN aŭ RAENN: mi pensas, ke la dua «A» estas eraro.

Ni konis vaŭdanojn, ĉar ni havas geamikojn loĝantajn en Lausanne, sed ni eksciis pri valdanoj dank' al la artikolo, kiun vi verkis kun Alain Favre.

Kuraĝigante vin mi kore salutas vin.

Daniel Houguet

Kara Amiko,

Mi ĵus ricevis la numeron 73 de Etnismo.

Mi deziras danki vin pro la rimarkinda laborego, kiun vi plenumis dum 31 jaroj.

Mi pensas, ke dank' al via agado, grava parto de esperantistaro ekkonsciigis pri la problemoj de malplimultaj lingvoj kaj kulturoj. Korajn salutojn al vi kaj Ursula.



Daniel Houguet, 65, rue de Toutes-Aides,  
F-44600SAINT-NAZAIRE BRETONIO



Estimata Sinjoro Moritz!

El la ĵus alveninta 73-a numero de la revuo Etnismo mi komprenis ke vi ekde nun ne plu estas redaktoro de la revuo. Ĉi-okaze mi volas plej kore danki vin pro la sendado de la unuopaj numeroj de via revuo. La revuo estas farata elstare, prezentas informojn pri problemoj, kiuj estas mia korafero, kaj informas pri tio sen antaŭjuĝoj kaj dediĉas sin al la tuta gamo de la problemoj de la minoritatoj kaj endanĝerigitaj etnoj - historio, politiko, lingvo, kulturo -. Mi ne konas la kaŭzojn de via decido, ili devas certe esti gravaj, sed miajuĝe estas bedaŭrinde. Esperable la nivelo de la revuo ne estos malpli alta.

Mi deziras al vi multan sukceson en via nova laboro, multan sanon kaj la tiom gravan trankvilon por krea agado.  
Kun multa danko kaj plej alta estimo

En Martin, la 5-an de julio 2003

D-ro Viliam Mruskovic (P.O Hviadoslava 19,  
SK (Slovakio)- 03601 Martin



Kara Sinjoro Moritz,


kun bedaŭro - sed ankaŭ kun kompreno - mi legas ke vi volas fordoni la eldonadon de Etnismo. Mi pensas ke tio ankaŭ estas por mi la momento por fini la abonon, kiun mi daŭrigis ankoraŭ dum la lastaj jaroj precipe pro

vi. Bonvolu forstreki min el la listo. Mi nur sukcesis trafoli mi, kaj ankaŭ miaj Esperanto-scioj ne serioze pliboniĝis.

Koran dankon pro via klopodado kaj ĉion bonan estonte, ja povas facile esti ke ni revidos unu la alian en iu kunveno.

Kun koraj salutoj

Profesoro  
d-ro Georg Kremnitz,  
Großbauerstr. 9,  
A - 1210 Wien



## « For la Beneŝ-dekretojn ! »

Germanaj reakciuloj baras la vojon al la ĉeĥoj en la Eŭropan Union

En *Etnismo*, n-ro 72, aperis artikolo sub la supre menciita titolo. En la n-ro 73 alvenis multaj literaj reagoj. En tiu-ĉi numero ni aperigas pluan leteron pri tiu temo.

Kiu volas forigi la Beneŝ-dekretojn?

Jam longa tempo pasis de la aprobo de la Beneŝ-dekretoj, surbaze de kiuj estis translokitaj en Germanion tiuj germanoj, kiuj simpatiis al naziismo. La dekretoj ne estis ilo por efektiviĝi venĝon kontraŭ la germanoj. Ili estis rajtigataj de sia tempo, ĉar ĉiam ekzistis minaco, ke ripetigis la sama situacio, kiel antaŭ la dua mondmilito, kiam armitaj grupetoj de naziistoj atakadis ĉeĥoslovakajn ĝendarmstaciojn kaj doganistojn.

Certe estas konata la propono de la "fina solvo" de la ĉeĥa demando, t.e. translokiĝi la ĉeĥan nacion al Arkta oceano. Oni eĉ aŭdas, ke ne ĉiuj germanoj en Ĉeĥoslovakio estis faŝistoj. Tio estas vera, en siaj hejmoj povis resti la ne-faŝistoj, sed da ili estis malmulte. Ekzemple la urbo Česká Kamenice apartenis al la plej fortaj naziaj elektoareoj. En la jaro 1935 el 3000 elektantoj donis siajn voĉojn al la sudet-germana partio 2300.


Ŝed ekzistas multaj aferoj, kiuj kunigas la germanojn kaj la ĉeĥojn, La kulturoj de ambaŭ nacioj estas similaj, ekzistis germanaj verkistoj, kiuj estis grandaj amikoj de la ĉeĥa nacio, ekzemple Adalbert Stifter aŭ Karel Klostermann, kiu eĉ verkadis ĉeĥe kaj estas amata de la ĉeĥa nacio kaj en kies verkoj ofte ne estas eble distingi, ĉu liaj literaturaj herooj estas ĉeĥoj aŭ germanoj, aŭ Egon Erwin Kisch kaj multaj aliaj. La germana romantika poeto Uffo Horn eĉ batalis en la jaro 1848 sur la barikadoj en Prago kontraŭ la habsburga absolutismo.

Estas vaste konata la amikeco de la ĉeĥa komponisto Bedrich Smetana kun Richard Wagner aŭ de Antonin Dvorak kun Johannes Brahms. Tio estas nur kelkaj el multaj ekzemploj. Laŭ mia opinio estus multe pli utile serĉi la aferojn, kiuj kunigas ambaŭ naciojn, ol emfazi tion, kio ilin disigas.

Kial tiuj, kiuj rifuzas la Beneŝ-dekretojn, nur nun dubigas ilin, nun, kiam la ĉeĥa respubliko estas akceptota en Eŭropan Union? Tio ne atestas pri ilia bona volo kaj puraj intencoj. Kelkaj el ili estas bone konataj - ili estas riĉuloj, kies patroj aŭ avoj aktive kunlaboris kun la naziistoj. Temas pri la homoj, kiuj deziras malamikiĝi ambaŭ niajn naciojn».

Kiel modelo por la amikeco de la ĉeĥoj kaj la germanoj povas servi amikaj rilatoj inter la ĉeĥaj kaj germanaj samideanoj - esperantistoj. Inter multaj el ili disvolviĝis bela persona amikeco. Ankaŭ mi havas en Germanio bonajn amikojn. Kaj tiel ĝi restu ankaŭ en la estonteco.

Jaroslav Mráz, J. Knihy 206/1, 337 01 Rokycany, CR



# INTERNACIA KOMITATO POR ETNAJ LIBERECOJ



Estimata IKEL-membro,

la Estraro de IKEL deziras sendi al vi siajn plej sincerajn bondezirojn por feliĉa 2004.

La mondo estas trapasanta gravajn ŝanĝojn, kaj nia Komitato ankaŭ. Dum la venonta jaro ni ŝatus daŭrigi tiun restrukturiĝon de nia organizo por ke ĝi estu pli efika kaj helpa al defendado de la lingvaj kaj etnaj homaj rajtoj. Tial, ni sendas al vi ĉi tiun enketilon, esperante ke vi deziros ĝin plenigi kaj resendi al:

**Daniele Vitali**

**6, rue du Fort Wallis - L-2714 Luxembourg.**

Sentu vin bonvena aldoni viajn komentojn, proponojn, sugestojn, kritikojn ktp.

Bonan 2004 kaj bonan kunlaboron! Amike, Daniele Vitali, IKEL-prezidanto

## Enketilo por la membroj de IKEL

- 1.- Ekde kiam vi estas membro de IKEL?
- 2.- Kiel vi konatiĝis kun la komitato?
- 3.- Kial vi decidis aliĝi? Kiuj estis viaj atendoj?
- 4.- Ĉu, laŭ vi, IKEL plenumas tiujn atendojn? Kiel ĝi devus adaptiĝi al la nova rapide ŝanĝiĝanta mondo?
- 5.- Ĉu vi legas la tutan revuon **Etnismo**? Se ne: Kion vi preferas legi?
- 6.- Pri kiuj temoj vi ŝatus ke **Etnismo** parolu pli ofte?
- 7.- Ĉu vi mem pretus sendi al la **Etnismo**-redaktoro materialojn pri temoj, kiujn vi konas?
- 8.- Ĉu vi vizitas la retejon de IKEL (<http://beam.to/IKEL/>)?
- 9.- Se ne: Kial ne?
- 10.- Kion vi dezirus trovi en la retejo?
- 11.- Ĉu vi mem pretus sendi al la reteja redaktoro materialojn pri temoj, kiujn vi konas?
- 12.- Ĉu vi pretus fariĝi membro de la listo de intervenintoj por sendi urĝajn leterojn al la registaroj, kiuj ne respektas la lingvajn kaj etnajn homajn rajtojn?
- 13.- Ĉu vi konas la **Deklaracion por Etnista Humanismo**? Ĉu vi konsentas kun ĝi?
- 14.- Ĉu vi mem pretus diskonigi tiun Deklaracion pere de celitaj agoj?
- 15.- Kiu estas via retadreso? Ĉu vi akceptas ke IKEL uzu ĝin por foje sendi informojn kaj alvokojn al interveno?

**Bonvolu indiki ĉi tie - laŭeble preslitere - viajn kompletajn nomojn kaj poŝtan adreson:**





## - INFORMILO 53

### 1.- Neformala estrarkunveno de IKEL

La 19-an kaj 20-an de julio, parto de la IKEL-estraro kunvenis en Eschweiler (Germanio). Kun Ursula Schnelle-Moritz, Uwe Joachim Moritz, Alain Favre kaj Daniele Vitali ĉeestis la nova **Etnismo**-redaktorino, Nicole Margot. Dum la kunveno oni preparis la aktivadojn de IKEL dum la UK en Gotenburgo kaj diskutis pri organizado de la Komitato, de la revuo kaj de la retejo dum la venontaj jaroj. La kunveno decidis turni sin al la membraro per kelkaj komunikoj, kiujn vi povas legi sampaĝe. Ĉiuj IKEL-anoj estas varme invititaj al kunlaborado favore al la lingvaj rajtoj de iuj!

### 2.- Ret-adresaro de IKEL kaj Etnismo

Por liveri pli rapidajn kaj oftajn servojn al la membroj, kaj ĉefe al la etnaj rajtoj kiujn ni defendas, ni volus starigi ret-adresaron de IKEL. Se vi havas elektronikan poŝton, sciigu nin pri tio je la adreso [ikel@uea.org](mailto:ikel@uea.org) aŭ [etnistoj@bigfoot.com](mailto:etnistoj@bigfoot.com)! La mesaĝoj kiujn vi ricevos estos informriĉaj, ne tro oftaj kaj via adreso ne aperos al la aliaj ricevantoj.

### 3.-Apelacio al kandidatiĝoj

Karaj membroj, en 2004 kiel vi scias UEA kongresos en Ĉinio kaj, en 2005, en Litovio. En ĉi tiu lando, kiu antaŭ kelkaj jaroj eĉ transdonis al IKEL medalon memore al la streboj de nia Komitato por la sendependeco de Litovio, ni volas elekti la novan Estraron. Kunlaboru kun ni, fariĝu estrarano! Jen kelkaj konkretaj taskoj, al kiuj vi povas kandidatiĝi.

### 4.-Pli facilas aliĝi aŭ realiĝi al IKEL!

Se vi vivas aŭ havas konton en unu el la landoj kie oni oficiale uzas eŭrojn, vi povas nun sendi monon al alia tia lando je la kosto de enlanda ĝiro! Tio signifas ke, por pagi vian IKEL-kotizon, vi ne plu devos suferi kromkostojn, ĉio fareblas rapide kaj efike kiel ĉe vi! Sufiĉas indiki, en via ĝirilo, la IBAN kaj BIC- (aŭ SWIFT-) kodojn de la konto de UEA en Nederlando:

**IBAN: NL24PSTB0000378964, BIC: PSTBNL21**

UEA havas kontojn en aliaj landoj. Kiam ni scios ankaŭ ties kodojn, ni publikigos ilin en **Etnismo**. Neniam forgesu, ĉiukaze, indiki la kialon de via ĝiro! Por IKEL, tiu ĉi estas, kiel antaŭe: **ikel-y**. Koran dankon! **Daniele Vitali**

### 5.-IKEL en la 88a Universala Kongreso en Gotenburgo

La kongresa temo, *lingvaj rajtoj kaj respondecoj* estis aparte interesa por etnistoj. Ĝi komencis esti traktata je la solena malfermo per prelego de la franca profesoro Charles Durand, fervora batalanto kontraŭ la hegemonio de la angla lingvo (li france verkis *Starigo de monopoloj pri la scio*, kaj *La nova milito kontraŭ inteligento*). La diskutoj pri la kongresa temo disvolviĝis sub la respondeco de Humphrey Tonkin, plej parte en diskutgrupoj.



Humphrey Tonkin reĝisoris la kongresan temon, kun la helpo de Probal Daŝgupto, bengalano, kaj Charles Durand. Probal Daŝgupto, kiu nun loĝas en Britio, montris sin aparte sentema pri la lingva malplimulto konstituata de elmi-

grintoj, kaj pri ties luktoj kaj malsukcesoj por konservi propran identecon. En la diversaj diskutgrupoj oni respondis al diversaj demandoj: *Kio estas lingva rajto? Ĉu ekzistas lingvaj respondecoj? Ĉu en via lando la lingvaj rajtoj havas lokon en via konstitucia juro? Ĉu estas diferenco inter individua lingva rajto kaj kolektiva lingva rajto? ktp.*

La ĉefa intereso de tiuj grupoj kuŝis en la fakto, ke multaj esperantistoj, kiuj ne kutimas esprimi ideojn, tie havis la okazon esprimi sin. La diskutoj ofte mallertis sed multaj certe ekkonsciis aŭ almenaŭ fajnis sian konscion pri lingva maljusteco. Tamen svarmis la voĉoj kritikante la temon

mem, opiniante, ke ne estas la rolo de esperantisto batali kontraŭ lingva hegemonio.

Je la fino de la kongreso H. Tonkin legis rezolucion, en kiu oni povas legi pri lingvo, kiel esprimilo de identeco, kiel tuthomara riĉeco, pri lingvaj rajtoj, kiel fundamentaj, rajtoj ankaŭ de minoritatoj, rajtoj aplikeblaj ene de ŝtatoj same kiel inter ŝtatoj. **N.M.**

### 7.-Estraro :

**PREZIDANTO** ☐ Daniele VITALI (padiano), 6-12, Rue du Fort Wallis, L-2714 Lëtzebuerg/Luxembourg. tel. ☐xx352489424,

retadreso ☐ [etnistoj@bigfoot.com](mailto:etnistoj@bigfoot.com)

TTT-ejo ☐ <http://Beam.to/IKEL/>

**VICPREZIDANTO** ☐ Uwe MORITZ (platdiĉo),

Im Römerfeld 44, D-52249 Eschweiler.

tel. ☐xx-49-2403-66888.

**KASISTINO**: Ursula SCHELLE-MORITZ (platdiĉo)

**GEESTRARANOJ** ☐

- Alain FAVRE (savojano), Damo de Vi, Allée du Quart d'Amo, F-74140 Chens-sur-Léman,

tel ☐xx-33450940208,

retadreso ☐ [afavre1@hotmail.com](mailto:afavre1@hotmail.com)

- HOSIDA, Acuŝi (japano)

Miyamnomori 2-18-18, Tomakomai, 053-0844 Japanio,

- Anita PERIĆ ALTHERR (slovenino)

Via degli Olmi 23, I-34135 Trieste

Tel ☐xx-39-40-414916.

- Jean-Claude THUMERELLE (Franco)

Rue Pierre de Simpel 10, B-7784 Warneton,

Retadreso ☐ [Thumerelle.jc@yucum.be](mailto:Thumerelle.jc@yucum.be)

**REDAKTORINO** ☐

Nicole Margot (vaŭdo)

Ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne

Tel ☐xx-21-653-14-67

Retadreso ☐ [n.margot@bluewin.ch](mailto:n.margot@bluewin.ch)

**SENDOSERVO** ☐ KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

Poŝtkesto ☐10088, E-08200 SABADELL

KATALUNIO - CATALUNYA

TEL ☐XX93-710 96 36

[Kea-kasisto@esperanto-ct.org](mailto:Kea-kasisto@esperanto-ct.org)

### 8.- Kotizoj kaj kontoj:

La jarkotizo de IKEL, pagenda **KOMENCE DE ĈIU KALENDARA JARO**, estas ☐

Membreco	eŭroj - € -
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono kiu aŭ loĝas en (eks-) socialisma aŭ «triomonda» lando aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian IKEL-kotizon **ekskluzive** al la konto de IKEL ĉe UEA (kodo: ikel-y) aŭ unu el jenaj kontoj de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam) ☐

- BELGA poŝtĝironto (pĝk) n-ro 000-1631831-97 ☐
- GERMANA pĝk n-ro 318291 509 (bankkodo 37010050) ☐
- NEDERLANDA pĝk n-ro 378964 ☐
- SVEDA pĝk n-ro 74374-0 ☐
- SVISA pĝk n-ro 12-2310-0 (Bulle).

**IBAN.NL24PSTB0000378964, BIC.PSTBNL21**

Ĉiukaze indiki «**ikel-y**» kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi ke via **kompleta** kotizo alvenu en la IKEL-konto ☐ IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn ☐

**Uwe Joachim Moritz**

### Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) ricevas **Etnismo**-n sen krompago. Aparta jarabono (normale ☐ 2 aŭ 3 kajoroj de sume 36 paĝoj) kostas 10.00 €. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kostas 5.00 € (inkluzive afrankon).

La artikoloj publicitaj en **Etnismo** ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la «**IKEL-Infomilo**» estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongi kaj lingve korekti kontribuojn.